

STARTO

N-ro 2/2014 (251)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Regiona renkontiĝo en Plzeň

la 15-an de marto 2014

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, pri informadiko (memstariĝis: AEH, junulara, fervojista)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova@centrum.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Vladimír Dvořák, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 999 091, vladimir.dvorak@esperanto.cz, (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

Vicprezidentino: Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, libuse.dvorakova@esperanto.cz (Muzeo de Svitavy, rilatoj al urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo)

Kasisto: Vratislav Hírš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 517 444 117, vratislav.hirs@esperanto.cz (membrodatumbazo, kontado)

Komitatanino: Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424, pavla.dvorakova@esperanto.cz (membroj, kluboj, sekcioj, konferencoj, informado, retaj projektoj, ekspozicioj)

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. UPC 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

Komitatano: Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, tel. 608 224 993, miroslav.hruska@esperanto.cz (junularo, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio kaj UK-peranto: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

Komitatano A de UEA: Miloš Bloudek, Vyšehradská 4, 360 01 Karlovy Vary, bloudek@volny.cz

Revizia komisiono de ĈEA:

Prezidanto: Jan Řepa (Fidel), Na Valše 250, 38411 Netolice, fidel@razdva.cz

Věra Gavandová, Komenského 657, 789 61 Bludov, vgavandova@email.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 09 Pardubice, ludmila.srbova@seznam.cz

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer domo, Máchova alej 1, 568 02 Svitavy, direktorino: Blanka Čuhelová, tel. 461 532 704, cuhelova@muzeum.svitavy.cz.

Kontrollegis: Sabine Hauge, la komitato.

REGIONA ESPERANTO- RENKONTIĜO EN PILSENO

La 15-an de marto 2014

Okaze de realigo de la migra ekspozicio pri Esperanto en Studa kaj scienca biblioteko de la Pilsena regiono estis iniciatita kunvoko de renkontiĝo tie, por iom vigligi Esperanto-vivon en la regiono. La inviton akceptis kvardeko da esperantistoj ne nur el Okcidenta Bohemio, sed ankaŭ el la najbaraj regionoj.

Pozitive estis, ke venis ankaŭ pluraj "novuloj", kiuj ĝis nun ne partoprenis ĈEA-aranĝojn. Kiel bonvenaj eksterlandaj gastoj venis Wolfram Rohloff, prezidanto de la germana KELI-sekcio, kun sia familio.



La aranĝo komenciĝis en la biblioteka ekspozicia koridoro per enkondukaj vortoj de Pavla Dvořáková, la aŭtorino

de la ekspozicia projekto. Al la kultura programo kante kontribuis Miroslav Smyčka (per fama "La Paloma") kaj Vladimír Türk (per propra esperantigo de la kanto "Kotva a kříž" - "Ankro kaj kruco" de Karel Kryl). Poste la partoprenantoj ekpomenis direkte al la ĉefplaco por iom konatiĝi kun almenaŭ kelkaj historiaj vidindaĵoj de Plzeň. Ĉiuj vizitis interesan miniaturan modelon de la urbo, prezentitan en la urbodomo. Post la komuna tagmanĝo en secesia perlo de la urbo, la hotelo Slovan, sekvis programo pri Esperanto-aktualaĵoj kaj kulturaj novaĵoj kaj komuna kantado. La partoprenantoj ricevis ankaŭ pluraj materialojn por lingve kaj fake spertiĝi pri fako de bierfarado.

Por la posttagmezo estis preparita tra-rigardo de historia Muzeo pri bierfarado.



Detalan kaj laŭ lingva vidpunkto zorgeme pretigitan esperantlingvan ĉiĉeronadon prizorgis Vladimír Türk. La kompleta ĉiĉerona teksto estis disponigita ĉe la kaso, tial kaze de via vizito ne forgesu peti la version en Esperanto! Tiel vi helpos montri, ke la lingvo estas uzata kaj utila!

La muzeo situas en la strato Velešlavínova 6, proksime al la ĉefplaco.

Pliaj informoj troveblas en <http://www.prazdrojvisit.cz/cz/pivovarske-muzeum>.



La renkontiĝo kulminis en neformala amika etoso per gustumado de specialaj bieroj en la muzea bierejo.



Espereble la renkontiĝo donis ioman impulson al reaktiviĝo de Esperanto-vivo en la okcidenta parto de Ĉeĥio. Ĝia unua rezulto estis planado de realigo de la migra ekspozicio en la informcentro en Spálené Poříčí sude de Plzeň por aprilo 2014 – dank' al volontemo de la loka paroĥestro kaj bona esperantisto d-ro Miroslav Vančo (sur la foto).



Loĝantoj en Okcidenta Bohemio, interesiĝantaj pri kontaktiĝo kaj kunagado, bv. skribi al Esperanto-klubo en Plzeň plzen@esperanto.cz, aŭ al delegito por la

regiono Karlovy Vary Miloš Bloudek
bloudek@volny.cz



-padv-

Ekspozicio en Lanškroun

Vendrede la 9-an de majo 2014 esperantistoj el Česká Třebová, Lanškroun kaj Nymburk renkontiĝis en la legejo de la urba biblioteko en Lanškroun, kie estas instalita ekspozicio „Ĉu Esperanto estas morta lingvo?“. Ili rememoris iamajn esperantistojn, kun kiuj ili kunvenadis inter la jaroj 1977-1990, ripetis interesajn vortojn trovitajn en Retkomunikoj kaj post promeno tra la urbo ili tagmanĝis en restoracio de konata pastro Czendlik „Ĉe Paŝtisto“.



Rimarko: Pri la planoj de la migra ekspozicio legu la paĝon 63.

La 8-a POSTFERIA RENKONTIĜO
sabate la 20-an de septembro 2014
en Stará Hut' apud Dobříš

Tradicia regiona aranĝo de la klubo „La Ponto“ Písek
ĉi-jare unuafoje okazos ekster limoj de Sudbohemia regiono.



PLANATA PROGRAMO:

Mallonga kultura-kleriga programo kaj komuna tagmanĝo
Vizito de la Muzeo de Karel Čapek en Strž
Partopreno en la kultura programo de "Solenaĵo de la falanta foliaro"
en la muzeo
Prezento de "Čapek en Esperanto" antaŭ la publiko
Promeno tra parto de la instrupado de Karel Čapek (2km)

La urbo Dobříš facile kaj rapide trafike atingebblas el Prago
(aŭte, buse, inkl. antaŭurban buson 317, trajne rekte al Stará Hut')
Bv. aliĝi ĝis 13.9. ĉe Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek,
tel. 774 942424, pisek@esperanto.cz

Ĝustatempaj aliĝintoj havas garantion de komuna tagmanĝo
kaj ev. eblecon de peraŭta transporto el Dobříš (placo) al Strž kaj reen.

Ebleco akiri librojn originale verkitajn en Esperanto

kiuj estas tradukitaj al la ĉeĥa lingvo. En la reto ĉe la adreso www.bezvydavatele.cz,
aŭ ĉe

Jindřiška Drahotová
Sadová745, Mladá Boleslav 293 01
tel. 720 652 320
drahotovaesperanto@seznam.cz



ĈEA kaj Klubo de amikoj de Esperanto Svitavy elkore invitas vin al

AŬTUNA SEMAJNFINO EN LA MUZEO 27.-28.9.2014



Sabate 27.9.

- 10:30 Inaŭguro de la nova tutjara ekspozicio en Esperanto-muzeo kun la temo *Esperanto kaj kolektado* kun akompana programo
 - Komuna tagmanĝo en la restoracio ASTRA (garantiata loko en restoracio kaj favorpreza elekto el 3 pretaj manĝoj — nur por aliĝintoj ĝis 14.9.)
 - Trarigardo de la tutŝtata regiona filatela ekspozicio (kun salono Esperanto) en la Urba Muzeo kaj Galerio (vidu <http://www.svitavy2014.estranky.cz/esp/>)
 - Sanktvenceslaa vingustumado surplace (kun zimbazona folkloro muziko), borso de kolektantoj
- 17:00 Kaze de intereso okazigo de borso de esperantaĵoj
 - Memstara vespermanĝo
 - 19:30 Vespera programo en la muzeo: Rakontado kaj projekciado pri Malajzio filmprojekciado, kantado kun gitaro ktp.

Dimanĉe 28.9.

- 9:00-11:30 Klerigaj seminarioj por ĉeĥlingvanoj: lingva (tradukado de turismaj tekstoj aŭ alia temo) kaj paralele komputila konsultejo (en la loka bazlernejo)

— nur kaze de almenaŭ 10 interesitoj!)
Ĉirkaŭ 12:00 forveturas trajnoj direkte kaj al Prago kaj al Brno

Por eksterlandanoj ebleco ekskursi tiutage en interesa ĉirkaŭaĵo
(renesanca urbo kaj kastelo Litomyšl, urbo Polička k.a.).
Konkretaj kondiĉoj kaj ev. plilongigo de la restado en la urbo/regiono
pritrakteblas.

Partopreno en la sabata programo en la Esperanto-muzeo
estas SENPAGA. Ekspozicio en la Urba Muzeo estas kontraŭ enirpago.
Dimanĉaj seminarioj por membroj de ĈEA kaj ĈEJ estas senpagaj, kotizo
por la aliaj estas 50,- CZK.

* * *

Krome ni ofertas tranokton en studenthejmo situanta en kvieta medio
proksime al la ĉefplaco. Spacaj modernaj 2–3 litaj ĉambroj (kun propra
duŝejo/necesejo, aŭ komuna por du ĉambroj) kontraŭ 250,—
CZK/persono/nokto. Ebleco pretigi matenmanĝon en kuirejeto
(propran vazaron prefere kunportu). Eblas mendi por 1 aŭ 2 noktoj
(26./27.9. kaj 27./28.9.). Konkretaj ĉambroj estos atribuitaj laŭ dato de
aliĝo kaj laŭ nombro de menditaj noktoj. La loĝkapacito estas limigita, ĉar
uzos ĝin ankaŭ neesperantistoj-partoprenantoj de la filatela ekspozicio, tial
propraintereze bv. aliĝi ĝustatempe,
plej malfrue ĝis 31.8.

Ankaŭ tiuj, kiuj ne tranoktos en Svitavy, bv. plej malfrue ĝis 14.9. anonci:
interesiĝon pri tagmanĝo, pri partopreno en la seminario
(pri kiu temo), kaj pri vendado aŭ interŝanĝo de viaj esperantaĵoj dum la
borso. Antaŭdankon por via solidareco kun la organizantoj
kaj via akurateco. Ni elkore ĝojatendas vian alvenon!

* * *

Aliĝadreso: Esperanto-Muzeo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy
telefonnumero 604 377 616, svitavy@esperanto.cz

Renkontiĝo en Litomyšl

Klubo de Esperanto-Amikoj en Svitavy ĉi-foje invitis esperantistojn sabate la 26-an de aprilo 2014 al renkontiĝo en Litomyšl. Kunvenis 26 personoj el 13 lokoj de Ĉeĥa Respubliko. Libuše Dvořáková kun aliaj klubanoj preparis denove interesan programon.



En la industria zono malantaŭ Litomyšl logis nin por vizito la entrepreno CIMBRIA HMD Litomyšl, kies 50%-posedanto estas dana kompanio. Ni iomete erarvadis serĉante surskribon CIMBRIA. Antaŭ la entrepreno nin atendis la direktoro por produktado inĝ Miloslav Krejbych, kiu rakontis al ni historion de la entrepreno kaj interesaĵojn pri la produktado. Oni tuj vidis, ke li estas homo flamanta por sia profesio, danke al kiu li ekkonis multajn landojn de la mondo.

Li kondukis nin tra projektistaj kontoroj, tra produkto-haloj, stokejoj kaj samtempe rakontis, al kiuj landoj la produktoj „vojaĝas“. Fakte temas pri ĉiuj kontinentoj. Oni ĉi tie fabrikas maŝinojn por kontraŭmikroba prilaboro de greno, transportilojn, gruojn ... Ni vidis tie fabrikaĵojn preparitajn por eksporto al Afriko, Usono, Ĉinio. En Danlando la

laboro estas jam komplete robotizita. Ĉi tie ne. En la fabriko laboras 120 homoj. Post finiĝo de la vizito ni rajtis demandi nian ĉiĉeronon, kiu respondis eĉ tro scivolemajn demandojn. Li provis ĉiujn profesiojn de la produktado kaj tial li povis senprobleme veturi al diversaj landoj por instali la produktojn kaj instrui al lokaj homoj la manipuladojn. Li konfidis, ke plej bonkoraj homoj estis en Nordio, kiuj laboris en tre primitivaj kondiĉoj, sed sciis donace dividi la malmulton, kiun ili posedis.



Ankoraŭ foto antaŭ la fabriko. Esperantistoj tie ne estas ĉiuj. Kiu venis malfrue, atendas en la restoracio “Bludička“ (Vaglumo), kie ni tagmanĝos. Antaŭ la manĝo ni povis gratuli al unu el la plej aktivaj esperantistoj okaze de lia vivjubileo. Sed li rapidas, ĉar li rolas en la posttagmeza programo.



Ni ankoraŭ povis rakonti pri laboro de niaj rondetoj kaj inviti amikojn al esperantistaj aranĝoj. Baldaŭ estos Esperanto-ekspozicio en Lanškroun, renkontiĝo en Bludov kaj Esperanto-tago en Pardubice. Ankaŭ hundino Kati montris, ke ŝi jam progresis en klereco kaj scias kalkuli.



La posttagmezo estis tiom pli riĉa. En la piarista preĝejo plejparte renovigita ni aŭskultis pri ĝia historio. Kaj poste procesio inaŭguranta la 3-an banurban sezonon de la spirito, tiel bunta procesio, ke la okuloj apenaŭ sciis satiĝi. Temas fakte pri blago, kiam la urbo ŝanĝiĝas en banurbon, tamen oni tie kuracas ne la korpon, sed la animon. Ĉiu povis aktive partopreni, promeni tra nove kreita kolonaro, kie parade veturis ankaŭ veteranaj aŭtomobiloj. Bonvenaj estis homoj en historiaj vestoj de la unua respubliko (1918-1938) kaj eĉ pli malnovaj. Infanoj povis pentri aŭ krei objektojn.

Kvankam la renkontiĝo ne okazis laŭ la klasika scenaro, al kiu esperantistoj kutimiĝis, danke la belan veteron ĝi sukcesis same kiel la antaŭaj.

*Zdenka Novotná
Matěj Nárožný*



*Fotoj: Zdenka Novotná
Libuše Dvořáková*

Ne nur kuraca akvo logis al Bludov

Sabate la 17-an de majo 2014 esperantistoj el pluraj lokoj de la respubliko venis al Bludov. Malbona vetero ne fortimigis ilin. Alveturis 31 personoj.



La banurbo Bludov troviĝas en belega kaj kvieta pejzaĝo sub la montaro Jeseníky. Ĝin fondis kaj inaŭguris en 1929 Zdeněk Pospíšil, kiu aĉetis parcelon kun fontoj de varma radioaktiva sulfo-jodida kaj sulfo-ferika akvoj kun temperaturo 39 gradoj.



Ni uzis la okazon por naĝi en la minerala varma akvo. Parko ĉirkaŭ la bandoma komplekso estis plena de florantaj rododendroj kaj azaleoj. Ni trairis kaj ekzamenis la civiton Bludov, kiu estas tre vasta kaj dividita je belaj

stratoj. La ordon kaj aranĝon povus envii multaj vilaĝoj kaj urboj. En la civito troviĝas tri elementaj lernejoj. Laŭ nombro de infanoj oni povas konkludi, ke tie vivas multaj junaj homoj. En unu el la lernejoj instruis ankaŭ membrino de Esperanto-klubo Šumperk, klubo organizanta la renkontiĝon.



Interesa estis Léhar-vilao, konstruita surloke de iama tombejo. Loĝis en ĝi instruisto de la unua lernejo. Nian atenton kaptis naskiĝ-domo de la ĉeĥa pentristo Adolf Kašpar, fama pro ilustraĵoj de Avino de Božena Němcová. Ankaŭ tiu domo servis certan tempon kiel lernejo.



Ni vizitis kripton de Žerotín-nobelaro, kie estas entombigita ankaŭ la lasta Žerotín, Karel Emanuel, kaj grafino de Žerotín, Marie Helena el Mornstein.

Ŝi vizitis Bludov en 1979 okaze de 100 jaroj de loka fajrobrigado, en 1985 ŝi forpasis kaj en 1996 ŝia urno estis metita en la kripton.



Belega estas preĝejo de Sankta Georgo rekonstruita antaŭ kelkaj jaroj. Alžběta Hloušková el Šumperk kantis en la preĝejo oper-ariojn por la partoprenantoj.

La posttagmeza programo sekvis en restoracio malantaŭ la preĝejo, la manĝejo estis plena de ĉasaj trofeoj. Post tagmanĝo la organizantoj regalis nin per propraj sukeraĵoj, ĉiu estis pli bongusta ol la alia. Sprita kaj originala tombolo elvokis multe da rido. Fine L. Angelová invitis ĉiujn ĉeestantojn al Esperantotago en Pardubice kaj mi al Svitavy por la Tago de Preĝejoj, Muzea Nokto kaj Regiona Filatela Ekspozicio.

Libuše Dvořáková
fotaj L. Dvořáková, K. Vala



Humphrey Tonkin

Obtíže memoárů: Překlady díla Tivadara Sorose

„Překládání knih se podobá jízdě na koni, čím koně lépe znáte, tím je jízda snažší. Při překládání jakéhokoliv memoáru musí překladatel znát dějinné i osobní souvislosti a také určit, k jakému žánru dílo patří (v tomto případě se jedná o holokaust). Ale překladatele „Maškarády kolem smrti“ čekají ještě další obtíže. Soros nepsal knihu ve své rodné maďarštině, ale v jiném jazyce, takže překladatel občas musel rozhodovat mezi tím, co autor napsal a co tím mínil.“

Celou přednášku o českém překládání *Maškarády kolem smrti* najdete na stránce:

<http://www.mlboleslav.cz/esperanto/?p=1265>

Alvoko de la elektokomisiono de ĈEA

Rapide alproksimiĝas la kongreso de ĈEA kaj ne forgesu, ke enkadre de ĝi okazos balotoj kaj dependas de ni ĉiuj, membroj de ĈEA, kia skipo de funkciuloj gvidos la asocion dum la venontaj tri jaroj.

Mi volas emfazi, ke en la kongreso 2011 estis akceptita nova Elektoregularo, kun kiu vi povas konatiĝi ĉe http://www.esperanto.cz/soubory/Vol_ebni_rad_CES.pdf (en la ĉeĥa lingvo). Lia ĉefa trajto estas, ke la plej forta akcento estas donata al la elekto de la estonta prezidanto, kiu enkadre de sia kandidatiĝo devas prezenti ne nur siajn viziojn, sed ankaŭ la kandidatojn por la komitato, kun kiuj li planas gvidi la asocion. La tasko de la elektokomisiono do estas trovi kandidatojn por la posteno de la prezidanto kaj serĉi konvenajn kandidatojn ankaŭ por aliaj postenoj en la komitato kaj tiujn rekomendi al la prezidantokandidatoj. Unu kandidato por la komitato povas esti (kaj eĉ estas rekomendite, ke estu) en la skipoj de pluraj prezidant-kandidatoj.

Ĝis nun estas nur unu kandidato por la posteno de la asocia prezidanto. Se iu el la membroj de ĈEA volus kandidatiĝi kiel kontraŭkandidato, bv. kontakti almenaŭ unu membron el la elektokomisiono (Jana Melichárková, Věra Podhradská, Petr Chrdle). Ankaŭ tiuj el vi, kiuj pretus helpi al la gvido de la asocio kiel unu el la membroj de la komitato bv. aliĝi ĉe ni

aŭ rekomendu iun, kiun vi konsideras konvena kandidato. La kondiĉo estas, ke la kandidato devas esti membro de ĈEA, pli ol 18-jara, kaj devas pruveble konsenti kun la kandidateco.

La plej mankanta(j), do dezirata(j), estas kandidato(j), kiuj volus okupiĝi pri la informado (precipe ekster Esperanto-movado) kaj/aŭ pri serĉado de monrimedoj por diversaj asociaj projektoj, sed klaras ke tio ne estas kondiĉo.

Mi turnas min ne nur al unuopaj membroj de ĈEA, sed ankaŭ al Esperanto-kluboj kaj sekcioj, ke oni pripensu dum siaj kunvenoj konvenajn kandidatojn — kaj se vi konsideros iun konvena, bv. informi nin, ke ni ŝin aŭ lin kontaktu.

Nome de la elektokomisiono: Petro Chrdle, chrdle@kava-pech.cz, adreso kaj telefonnumero en la kolofono de Starto.

Esperanto ĉe produktoj

Se vi aĉetos botelon da likvoro Fernet de la firmo Dynybyl, sur la etikedo vi trovos informon, ke la fondinto Emil Dynybyl nomis sian entreprenon Verda Stelo, ĉar li estis entuziasmulo por Esperanto (inter la du mond-militoj).

La retejo <http://www.nakupvino.cz> proponas tri likvorojn kun nomo MEX – Esperanto el la distilejo Azteca (prezoj ĉirkaŭ 2 mil kronoj). Enskribu la vorton *esperanto* en la serĉilon *Hledej*.

ĈEA-aktivecoj kun kaj por nevidantoj

La 1-an de majo 2014 okazis en Prago aktivula kunsido de la Sekcio de nevidantoj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Ĉi-foje partoprenis ĝin ankaŭ ĈEA-estraranino Pavla Dvořáková por konkrete priparoli eblan kunagadon kaj interŝanĝon de materialoj. La unua labora prepara renkontiĝo okazis jam en marto 2014 en Olomouc.

Bonŝance evoluo de tekniko kaj de komputilaj programoj faciligas al nevidantoj uzon de interreto. Al ili apartenas ankaŭ parolsinteziloj, transformantaj retpoŝtajn leterojn kaj alian ciferecan tekston (en taŭga formato) al parola vorto. Ĉar "Starto" nun ne plu estas laŭtleĝata, oni serĉis kaj sukcesis trovi la ĝustan formon de Starto por parolsintezo kaj por pli bona orientiĝo en la enhavo. Rekompence la sekcio liveris pli novajn numerojn de sia songazeto "Aŭroro", kiuj estos ĝis somero surretigitaj kaj aperos pri ĝi pli detala artikolo en www.esperanto.cz. ĈEA ankaŭ proponis sian kontribuon al la sekvaj numeroj, i.a. pere de kelkaj laŭtleĝitaj "Rakontoj el la dua poŝto", ĉar tiuj koincide ekzistas en Esperanto ankaŭ en brajlo (la gazeto aperas paralele en skriba kaj en sona formoj). Okazis reciproka interŝanĝo de Esperanto-kompaktdiskoj kaj estis interkonsentite ricevadi poparte perrete pluajn sondosierojn (pri muziko, poezio ktp.), realigitajn kadre de ĈEA-projektoj. Sekcio de nevidantoj kaj ĝiaj aktivecoj estos aparte prezentitaj en la nove preparata

ekspozicio en Esperanto-Muzeo en Svitavy. Por akompana programo de la inaŭguro estos preparita i.a. praktika prelegeto, kiamaniere nevidantoj aŭ malbonvidantoj uzas komputilon. ĈEA ankaŭ instigis la membrojn de la sekcio, kiuj estas profesiaj muzikinstruistoj, fari registraĵojn de muziko kaj Esperanto-kantoj, kaj proponis realigi la eldonon kaj financi la elspezojn. Volontuloj pri reciproka kunlaboro estas bonvenaj! Interesitoj povas kontakti la estron de la sekcio s-ron Jan Příborský priborsky@brailnet.cz.
-padv-

Interlingvistika Simpozio

okazos en Poznano 25-26.09.2014

La ĉefa temo: **Problemoj de internacia lingva komunikado kaj iliaj solvoj**

Ni invitas vin partopreni (kun aŭ sen prelego). La simpozio okazos post la interlingvistika sesio kaj tuj antaŭ la **30a Arkones** (arkones.org), kiu ofertas al vi riĉan kulturalan programon post la scienca. Informoj: <http://www.amu.edu.pl/~interl/> Angle sur la internacia listo de lingvistoj: <http://linguistlist.org/callconf/call-action.cfm?ConfID=178275>

Prof. dr Ilona Koutny, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj, gvidanto de la Finn-Ugra Katedro Universitato Adam Mickiewicz, al. Niepodleglosci 4, PL-61-874 Poznan, ikoutny@amu.edu.pl

T: +48 61-829-36-75 posxt.: +48 605-783-454

hejme: +48 61-872-83-09

<http://www.amu.edu.pl/~interl/>

LA 9-A SABLA PRINTEMPO

14.-18.5.2014 en Skokovy

La seminario, origine okazinta en Písek (Sablo), denove realiĝis kune kun la Lingva Seminario, organizata de AEH en la pensiono ESPERO en Skokovy (Bohemia Paradizo). Programoj de ambaŭ aranĝoj estis interplektitaj kaj disponeblaj por ĉiuj ĉeestantoj. Ĉi-jare la partopreno estis negranda, tamen tio almenaŭ ebligis pli intensan konkretan laboron.

Ĵaŭde vespere kadre de la programo "Aktualaĵoj pri Esperanto en Interreto" oni konatiĝis i.a. kun novaĵoj en www.esperanto.cz kaj novaj registraĵoj ĉe la Muzea paĝo ĉe Ipernity kaj en Youtube. Estis prezentita Esperanta Retradio de Anton Oberndorfer el Aŭstrio (<http://aldone.de/retradio>), kiu ĉiutage alportas novan kelkminutan registraĵon diversteman, krome kun ebleco paralele sekvi la aŭskultatan tekston en skriba formo. La partoprenantoj ankaŭ lernis, kiel pere de la senpaga servo <http://leteckaposta.cz> sendi grandajn dosierojn (videojn, grandajn fotojn) por ne ŝtopi retpoŝtkestojn de la aliaj. La instrukciado estis kompletigita ankaŭ per projekciado de mallongaj amuzaj filmoj en Esperanto.

La ĉeftemo de la seminario estis denove "Sonregistraĵoj". Dum la pasinta jaro oni konatiĝis kun laboro en la programo Audacity kaj esploris bazojn pri registrado de la propra voĉo – ĉi-jare oni jam progresis kaj interesitoj klopodis sonregistri elektitan tekston uzeblan por disaŭdigo en interreto. Dum la enkonduka vendreda seminario "Malkovru vian voĉon" Pavla Dvořáková en formo de praktikaj ekzercoj montris efikajn meto-

dojn por rilaksi la korpon, plibonigi la spiradon, malstreĉigi kaj taŭge laŭtigi sian voĉon, klarigi prononcon kaj artan prezenton. La finan rezulton (i.a. per deklamo de la fama "Esperanta eliksiro" de Raymond Schwartz) la partoprenantoj prezentis por amuziĝo sabate vespere. Pri la registrado kaj sonreĝisorado okupiĝis lektoroj Pavla Dvořáková, Jan Markovič kaj Miroslav Vaněk. Sub ilia gvido Jindřiška Drahotová, Margit Turková, Karel Votoček, Petr Chrdle, Marie Píchová, Jaroslava Malá kaj Milada Zemanová sukcesis realigi diverstemajn sonregistraĵojn, kiuj estis sekve teknike prilaboritaj kaj surretigitaj ĉe Ipernity. La ligiloj aperis en esperantlingvaj Aktualaĵoj en www.esperanto.cz kaj en Retkomunikoj 2014/2. La lektoroj kontribuis ankaŭ al la amuza programo (muzikumado dum la adiaŭa vespero kaj rilaksa kolorigado de mandaloj).

La organizantino esperas trovi pliajn interesitojn pri registrado kaj pri kunlaboro de ĈEA kun la Retradio. ĈEA krome planas proponi elektitajn sonregistraĵojn el la nove konstruata internacia interreta datumbazo de la teamo E@I www.bretaro.net, por ke la rezultoj alireblu por esperantistoj internaciskale. Interesitoj pri la temo "sonregistrado" ne hezitu skribi al

pavla.dvorakova@esperanto.cz

-padv-

Projekto Bileto

<https://www.bileto.cz/> proponas facilan aĉeton de biletoj por trajnoj, sed Ĉeĥaj Fervojoj atentigas, ke ili havas nenian kontrakton kun la privata subjekto.

**ĈEA-KONGRESO EN
PROSTĚJOV
24.-26.10.2014**



DUA INFORMILO

Estimataj gemembroj,
proksimiĝas la dato de la plej pinta
ĉiujara aranĝo de ĈEA, al kiu ni
volus elkore inviti vin kaj alporti
precizigajn informojn.

OKAZLOKOJ:

1) Studenthejmo (Domov mládeže),
Palečkova 1 (kie ni loĝos, manĝos
kaj kie okazos vendreda vespera
programo kaj dimanĉa antaŭtag-
meza programo

- disponeblos manĝejo kaj klubejo
(por du paralelaj aranĝoj) situantaj
ĉ. 200m de la loka trajnstacidomo
kaj ĉ. 400 metrojn de la urbocentro,
el la ĉefa kaj busa stacidomoj ating-
eblas per urbobusoj 19 kaj 32.

2) Salonego de Domo de servoj
(Dům služeb), Olomoucká str. (kie
okazos oficiala laborprogramo sa-
bate antaŭtagmeze kaj kultura pro-
gramo sabate vespere) situanta je
distanco de 10-15 minutoj piede de
la studenthejmo.

LOĜKONDIĈOJ:

La loĝlokon multaj el vi jam konas,
ĉar en ĝi i.a. oni tranoktis dum
solenaĵoj kaj aranĝoj de la loka
klubo. Plimulto de la ĉambroj estas
3-litaj (ekipitaj per nova meblaro)
kaj entuta kompleta kapacito estas
66 litoj. Tamen necesas dekalkuli
lokojn, se aliĝos geedzaj paroj aŭ
por 4-litaj ĉambroj, se neniu aliĝos
por ili, kio la kapaciton malpliigos.
Pro tio ni petas vian komprenemon,
ke ĉefe oni loĝos triope (aŭ 4-ope se
oni preferos) kaj ke sole geedzoj
rajtos postuli loĝi duope kontraŭ
krompago.

Same pro tio nur al unuaj 50
aliĝintoj (espereble iom pli) ni
povas garantii loĝadon tie kaj petas
vin aliĝi frue. Pli postaj interesitoj
loĝos en similaj kondiĉoj, sed ne
kun la ĉefa grupo!

Plejmulto de virinoj okupos la 1-
an etaĝon, por ke komunaj neces-
sejoj/duŝejoj tie servu sole al ili,
dum por viroj servos la 2-a etaĝo.

La lokon kaj kondiĉojn mem
elektis kaj aprobis la pasintjara
konferenco konsiderinte avantaĝan
prezon kaj nur 2 tranoktojn.

En esceptaj kazoj eblos uzi ŝarĝ-
lifton. Al interesitoj pri pli luksa
loĝado ni rekomendas mem aranĝi
EUROPENSION el Olomoucká
112

[\(http://www.europension.wz.cz/\)](http://www.europension.wz.cz/).

MANĜOJ:

Okazos trifoje tage en manĝejo de la studenthejmo. La prezo estas sendube tre avantaĝa, eĉ pli, se vi mendos la manĝojn komplete ene de "pakaĵeto".

Ni esperas, ke vi utiligos la oferton, ĉar la servo realiĝos sub kondiĉo, ke ni mendos de ĉiu manĝo almenaŭ 40 porciojn.

Kiel kutime, eblos mendi ankaŭ senviandan varianton.

PREPARATA PROGRAMO:

Vendrede posttagmeze – akcepto, loĝigo, laŭinterese konversacia rondeto aŭ kunveno de laborgrupoj/sekcioj.

Vendrede vespere – filma/literatura/kleriga/muzika programo.

Sabate antaŭtagmeze – jarkunveno kun raportoj, diskutoj kaj balotoj por la sekva trijara periodo.

Sabate posttagmeze – promeno kaj urbotrarigardo, laŭbezzone post la 16-a horo daŭrigo de la labortraktado.

Sabate vespere – koncerto de vakera muzikgrupo Marodi el Ostrava kaj de konata Esperanta "bardo sen barbo" Georgo Handzlik kaj kompreneble ankaŭ balo kun riĉa tombolo.

Dimanĉe antaŭtagmeze – asociaj celoj por la nova periodo, diskutoj.

URBOTRARIĜARDO:

Dum la urbopromeno vi povos konatiĝi ne nur kun vidindaĵoj de la ĉefplaco kaj kun gotika preĝejo de Avancigo de Sankta Kruco, sed i.a. kun altvaloraj konstruaĵoj en stiloj de secesio kaj konstruktivismo, kiuj estas

la urba specifaĵo kaj fieraĵo. Inter ili certe ne mankos secesia Nacia domo, projektita de Jan Kotěra, kiun ni trarigardos ankaŭ interne. La nuntempan urbodomon multaj ĈEA-membroj jam vizitis, do ĉi-foje vi havos la eblecon vidi la eksan renesancan urbodomon kaj ev. ankaŭ viziti en ĝi situantan Urban muzeon. Nelastvice ni vizitos ankaŭ Esperantan ekspozicion en la kinejo METRO.

ALIĜOJ:

La aliĝilon vi povas sendi per klasika poŝto, sed **preferinda vojo estas per interreto** – la aliĝilon vi trovos en <http://www.esperanto.cz/aligxilo2014>

Ĉeĥlingvan aliĝilon (identan kun tiu en Starto) vi povas elŝuti en

<http://www.esperanto.cz/cs/akce/celosvatni-sjezd-ceskeho-esperantskeho-svazu-651.html>.

La plej avantaĝajn kondiĉojn ĝuos aliĝintoj ĝis la 15-a de septembro 2014! Ne forgesu la eblecon atingi senpage novan legitimilon de ĈEA aŭ senpagan legitimilon por la urba trafiko, sed nur por aliĝoj ĝis 30.9.2014!

Ĉiuj ĝustatempaj aliĝintoj ricevos supozeble komence de oktobro trian informilon kun konfirmo kaj pli precizaj informoj inkluzive mapeton, trafikan atingebilon, precizan programhoraron ktp.

**NI ĜOJATENDAS SINCERE
RENKONTIĜON KUN VI!**

Přihláška na sjezd ČES (Prostějov 24.-26.10.2014)

Přihlášku vyplňte a zašlete emailem na adresu vratislav.hirs@esperanto.cz nebo poštou na adresu pokladníka Ing. Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Ruprechtov nebo úplně nejlépe - vyplňte elektronický formulář na adrese www.esperanto.cz/aligxilo2014

Doporučení: Po vyplňovacích polích se pohybujte klávesou TAB. Tak žádné políčko nepřehlédnete.

jméno a příjmení příp. včetně titulů (tak bude na jmenovce účastníka sjezdu)

adresa:

ulice

PSČ

 a místo

e-mail

telefon

číslo občanského průkazu / pasu (povinný údaj jen pro ubytované)

**Označení u čtverečků křížkem (nastavíte mezerníkem) znamená výběr.
Zakroužkování (při ručním vyplňování) okolo čtverečku ruší (chybný) výběr.**

Souhlasím se zveřejněním jména a místa z adresy v seznamu účastníků.

Přihlašuji se na sjezd Českého esperantského svazu v Prostějově, objednávám a zavazuji se uhradit:

Základní účastnický poplatek	250 Kč	<input type="checkbox"/>
Zvýhodněný účastnický poplatek pro členy ČES, ČEJ, SKEF přihlášené po 15.9.2014	200 Kč	<input type="checkbox"/>
Zvýhodněný účastnický poplatek pro členy ČES, ČEJ, SKEF kteří se přihlásili a zaplatili nejpozději 15.9.2014	150 Kč	<input type="checkbox"/>
Čestný člen ČES, nevidomý člen ČES, člen výboru ČES, místní organizátor	0 Kč	<input type="checkbox"/>
číslo průkazu člena ČES, popř. ČEJ či SKEF (pro ověření členství - nečlenové napište 5 číslic, použijte jako variabilní symbol platby)		<input type="text"/>
Jako student do 26 let uplatňuji slevu 50 % z účastnického poplatku (nárok na slevu prokáži při prezenci)		<input type="checkbox"/>

Pozn: Na základě smlouvy s ČEJ a SKEF mají jejich členové právo na stejné poplatky jako členové ČES.

Ubytování je zajištěno v Domově mládeže, Palečkova 1, se sociálním zázemím na chodbě, po trojicích (na přání ve čtveřicích) na pokojích. Kvůli kapacitě pouze manželské dvojice mohou volit 2-lůžkový pokoj (za příplatek). Pouze prvních 50 přihlášených má jistotu ubytování v Domově mládeže, Palečkova 1, pro další najdeme ubytování obdobné kvality na jiném místě.

chci ubytovat s: (vepište 1-3 osoby – platí, jen pokud je požadavek vzájemný)

Nebude-li spolubydlící uveden, rozdělíme přihlášené do pokojů dle pohlaví a věku!

Můj věk je	<input type="text"/> let
Spím výrazně hlasitě	<input type="checkbox"/>
Jsem vegetarián (volba jídla pro stravující se)	<input type="checkbox"/>

Objednávám zvýhodněný kompletní balíček:

2 noci v 3-4-lůžkovém pokoji (dle „chci ubytovat s:“ výše) a stravování od páteční večeře do nedělního oběda	790 Kč	<input type="checkbox"/>
2 noci v dvoulůžkovém pokoji (možné pouze pro manžele) a stravování od páteční večeře do nedělního oběda	850 Kč	<input type="checkbox"/>
2 noci a stravování od páteční večeře do nedělního oběda (pouze pro členy výboru a místní organizátory)	330 Kč	<input type="checkbox"/>
bez noclehů, stravování od páteční večeře do nedělního oběda (pouze pro členy výboru a místní organizátory)	330 Kč	<input type="checkbox"/>

Objednávám jen jednotlivé ubytovací a stravovací služby:

Pozn.: Nevyplňujte, pokud již máte objednaný zvýhodněný kompletní balíček.

Při objednání ubytování je nutno objednat oba 2 noci! (Cena je uvedena vždy za oba.)

2 noci, z pátku a ze soboty na 3-4 lůžkovém pokoji	440 Kč	<input type="checkbox"/>
noci z pátku a ze soboty na 2 lůžkovém pokoji (jen pro manžele)	500 Kč	<input type="checkbox"/>
večeře - pátek	75 Kč	<input type="checkbox"/>
snídaně - sobota	45 Kč	<input type="checkbox"/>
oběd - sobota	80 Kč	<input type="checkbox"/>
večeře - sobota	75 Kč	<input type="checkbox"/>
snídaně - neděle	45 Kč	<input type="checkbox"/>
oběd - neděle	80 Kč	<input type="checkbox"/>

členský příspěvek ČES na rok 2015	<input type="text"/>	Kč
případný dobrovolný příspěvek pro ČES	<input type="text"/>	Kč
příplatek za přihlášku po 15.10.2014	100 Kč	<input type="checkbox"/>
za platbu na místě (Přihlášky na místě jsou však bez záruky!)	100 Kč	<input type="checkbox"/>

Žádám o vystavení nového průkazu člena ČES (bezplatně)	<input type="checkbox"/>
--	--------------------------

Upřesnění při společné platbě:

Za mne platí	<input type="text"/>
Já platím za	<input type="text"/> částku <input type="text"/> Kč

Částka k úhradě celkem

Kč

(kontrolu či přepočítání provede pokladník ČES, který přihlášku také obrátem potvrdí na uvedenou emailovou adresu)

Úhradu proveďte na účet ČES:

Fio banka, číslo účtu 2800186228 / 2010

Jako **variabilní symbol** uveďte číslo svého průkazu člena či čísla, které jste tam (jako nečlen - právě jen pro tento účel) uvedl(a)!

Přihláška je platná až po zaplacení.

Pro závazně přihlášené do 30.9.2014 místní klub zajistí bezplatnou jízdenku na MHD.

V případě odhlášení se účastnický poplatek nevrací! Odhlášení po 20.10.2014 budeme řešit individuálně a poplatky zahrnou i již nezrušitelné služby.

V dne .2014
podpis (pro přihlášky poštou)

František Baďura heroa esperantisto

František Baďura naskiĝis la 29-an de aŭgusto 1896 en Paskov kaj mortis antaŭ 55 jaroj en Brno la 4-an de aŭgusto 1959.



UEA-delegito
en Stonava

Pri liaj infanaĝo kaj juneco mankas al ni informoj, sed ni scias, ke en 1927 li estis UEA-delegito en Stonava kaj en la jaroj 1931-1932 li prezidis la Esperantistan klubon en Brno. En tiu funkcio li inaŭguris la

5-an Internacian Kongreson pri Seksa Reformo, okazintan en Brno (21.-26.9.1932), kaj prelegis en Verda Stacio (14.6.1932) pri ĉeĥoslovaka sporto.

Laŭ profesio li estis polica inspektoro kaj dum milito li deĵoris en eksterlanda armeo. Post la milito li rakontis siajn aventurojn al Josef Vondroušek, kiu liajn rememorojn priskribis en la revuo Esperantista (20.8.1946), por Verda Stacio ilin tralegis Adolf Malík (21.10.1946).

Ni citas el la artikolo de Josef Vondroušek *Prezidinto de E-Klubo en Brno batalis en ĉs.* eksterlanda armeo*:

Bonega homo, ĉiam ŝercema k. gaja, energia k. kuraĝa, k. sindona esperantisto. Ni opinias, ke legantoj de »Esperantista« trovos interesaj liajn sortojn, travivaĵojn k. spertojn pri Esperanto ĉefe en proksima Oriento. Jen sekvas konciza priskribo de l' travivaĵoj, kiel ni ilin notis laŭ rakontoj de s-ano Baďura. Li mem pro suferinta grava malsano ne kapablas sufiĉe uzi la dekstran manon:

Post la germana okupacio: laboro en subtera organizo k. jam en februaro 1940

akuta danĝero, gestapo venas por aresti min. Tiel komenciĝis mia fuĝo k. vojaĝo eksterlanden en ĉeĥoslovakian armeon. Kelkajn tagojn mi kaŝadis min en Brno, apud Brno, Praha, Přerov, fine mi feliĉe transiras slovakian landlimon per ŝarĝvagonaro al Púchov k. Bratislava. En marto 1940 mi transiras nokte kun 10 oficiroj hungaran limon, sed trafas nin la unua akcidento; ni estas arestitaj k. eskorte venas en Budapeŝton. Tie en karceroj pli ol 300 ĉeĥoj-fuĝintoj k. ni spertas malsaton, malvarmon, pedikojn, dormadon sur cemento sen kovriloj.

Post unu monato postulas gestapo mian transdonon - ili juĝas, ke mia kulpo estas aparte granda, ĉar mi estas polica inspektoro, kiu eĉ moviĝis inter ili - k. mi estis eskortata en Košicen k. sur limo atendas min malbona fino. Sed ne, en tunelo ĉe Košice denove per fuĝo mi savas min, ricevas helpon de la Pola Ruĝa Kruco, k. en la sama nokto vagonare Budapeŝton. Tie franca konsulejo organizas vojaĝojn en Jugoslavion. El Budapeŝto al la jugoslava limo ni estis forveturigitaj per aŭtomobiloj, nokte denove transiro de la limo trans marĉejoj, tiam jam sukcesa. Sur la limo frata akcepto fare de jugoslava limgvardio k. venontan tagon komforte en Beogradon.


En la ĉefurbo de Jugoslavio funkciis ĉs. militista oficejo, do unue rekrutiĝo k. envicigo en transporton al Beyrut kun fina destino: Francio. Mia transporto estis forvojaĝonta nur post du monatoj, do mi laŭ la jarlibro elserĉis tiean esp. klubon k. dum du monatoj mi ĝin regule vizitadis. La kunvenoj okazadis precize, malgraŭ la senteble kreskanta k. pliakriĝanta krizo k. danĝero k. ŝate mi ilin partoprenis.

* ĉs = ĉeĥoslovaka

Post du monatoj mi adiaŭis la gast-amajn, zorgoplenajn, sed firme deciditajn samideanojn k. forveturis al Beyrut. Sed en Francion ni jam ne veturis, Francio estis venkita k. kapitulacis. Ni estis transprenitaj de Angloj k. veturis en Palestinon, kie estis formata ĉs. korpuso de Meza Oriento. En Palestino ni submetiĝis al funda militista edukado k. ekzercado, nu k. sekvis kutima k. tamen eksterordinara soldatvivo k. kampado. Kaj renkonten al samideanoj de Jerusalema, Betlehem k. de aliaj lokoj. Ĉie kora akcepto, ĉie fervoro, ardo, vigla vivo, multegaj konatiĝoj k. amikaj rilatoj, multegaj konatiĝoj kun esperantistoj-soldatoj el la tuta mondo, nome Angloj, Aŭstralianoj, Novzelandanoj, Poloj, Hindoj, Afrikanoj ktp. Same en Tel Aviv, Haifa k. a. Ne mankis prelegoj pri Ĉeĥoslovakio k. oftaj informoj. Ankaŭ en ilia societo vizitoj al memorindaj k. sanktaj, lokoj, al la Morta maro.

Post finekzercoj deĵore en Egipton. Post alveno en Aleksandrijo mi tre baldaŭ ekinterrilatis kun s-anoj. Tiama prezidanto de la klubo, kun multaj membroj, estis s-ano Bell, bonega, vigla k. tre aktiva homo. En la klubo diversaj nacioj, krom Egiptanoj, Grekoj, Angloj k, a., societo amika, tre agrabla k. ĉarma k, interesa.

En Egipto oni bone vojaĝis, soldatoj havantaj forpermeson veturis senpage. Dum mallongaj forpermesoj mi entreprenis multajn ekskursojn al Kairo, kun belegaj ĝardenoj k. granda zoologia ĝardeno, al piramidoj k. sfinksoj, templo Karnak, en Valon de reĝoj, Luksor, Fajum, Assuan ĝis al limo de Sudano. Mi ne forgesos amikaĵojn de s-anoj en Fajum, nome Migalli k. Nasif.



Fr. Baĉura en Fayum (Egipto), 7. 7. 1941.

Ankaŭ mi estis enkondukita de egiptaj samideanoj al potenca guberniestro. Akcepto okazis kun plena patricia digno k. laŭ tradiciaj ceremonioj k. invito al solena vespermanĝo en granda luksa palaco halo, oraj pladoj k. pokaloj, juveloj, sudanaj negroj bunte zonitaj, ĉion vidantaj k. ĉion sciantaj, mirakle priservis divenante k. tuj plenumante ĉian ajn deziron. La altrangulo mem parolis Esperanton. Lia persona sekretario, arda esperantisto k. ĉarma amiko. Donace mi ricevis egiptajn skulptaĵojn k. aliajn karajn memoraĵojn.

En Oriento mi renkontadis ĝenerale bonege parolantajn s-anojn, lingva talento de l' orientanoj estas ja konata. Ofte mi vojaĝis deĵore inter Egipto k. Palestino k. okazis diversaj k. surprizaj renkontoj kun esperantistoj.

Vagante en montoj de Judeo mi falis en manojn de Beduenoj, ili estas timindaj k. konataj rabistoj. Kiam mi diris, ke mi estas el Ĉeĥoslovakio, ili tuj ŝanĝis sian konduton, iĝis amikaj, troviĝis inter ili unu, kiu konis nomon de prezidento Masaryk k. montris lian portreton, kiun li portis ĉe si. Kaj poste mi estis laŭ ilia plej bona ebleco gastigita k. la sekvantan tagon tre bone adiaŭis.

Venis bataloj ĉe Tobruk, El Alamein, elpelo de Rommel el Afriko k. ĉs. korpuso en la j. 1944 veturas en Anglion. Tie trafis min danĝera meningito k. akceptas min hospitalo en Hammer-smith. Skribinte al esp. klubo londona, mi ricevas karan k. simpatian viziton de s-anino Major, kiu alportis diversajn esp. gazetojn k. librojn. Post resaniĝo mi venis al mia korpuso en Southend-on-See, bela marurbo k. banloko sude de Londono. Kore mi rilatis kun multaj samideanoj k. iliaj familioj, nome kun s-ano Murray. Dum la instruista kongreso en Londono prelego pri Ĉeĥoslovakio k. intervjuado.



Fr. Baĉura en Kairo ĉe Isis-statuo.

En Anglio estis la movado tre aktiva, sistema k. vigla., novaj amikoj ĉe ĉiu paŝo, esp.-soldatoj en ĉiuj aliancaj armeoj. Plaĉis al mi tie, ĉeĥoslovakoj estis ŝatataj, ĉiu plene renkonten iris al ni, Angloj scias mirinde labori k. esti tre gajaj, la virinoj tre serioze k. eminente plenumis taskojn en ĉiuj fakoj.

En oktobro 1945 aŭtomobile trans Francio k. Germanio en denove liberan, sopiratan patrujon.

Miaj spertoj pri Esperanto, kiu akompanis min dum la tuta vojaĝo, estas la plej bonaj, rememoroj la plej agrablaj. Ĉie mi per ĝi trovis amikan medion,

helpemon, agrablajn k. klerajn kunulojn. Neniam mi preterpasis okazon elserĉi ilin k. ne estis urbo, kie ili ne estus.

Finante, mi elkore dankas ĉiujn samideanojn el Jugoslavio, Palestino, Egipto, Anglio k. la ceterajn el la tuta mondo, kiujn mi renkontis neatendite sur miaj vojoj.

Skribis J. Vondroušek



Fr. Baĉura en domo de samideano Anastas en Betlehem.


Rimarko: En la reta *Enciklopedio de Brno* ni ekscias, ke li edziĝis 27.4.1920 al Marie Polášková en Polešovice, loĝis tiam en Uherské Hradiště kiel soldato. Al Brno li venis 8.12.1924 kiel ĝendarmo. La subtera kontraŭfaŝisma organizo, al kiu li aliĝis, nomiĝis *Obrana národa* (Defendo de la Nacio). Lia patro estis Josef Baĉura, metalurgiisto en Paskov, lia patrino Anežka Baĉurová, fraŭline Košáková.

-mm-

* * *

Fono de la nova eldonaĵo de KAVA-PECH

En 2012 mi veturigis peraŭte amikojn Moisej (Mikaelo) Bronŝtejn kaj Gerrit Berveling, remonstrantan pastoron. Estis post la OSIEK-konferenco. Dum preskaŭ la tuta vojaĝo inter Svitavy kaj Prago mi ĝuis ilian interparolon, plejparte demandojn de Mikaelo kaj klarajn respondojn de Gerrit - pri Kristanismo kaj ĝia historio. Mi atente aŭskultis kaj ekkomprenis, ke ĝuste tiuspecaj informoj mankas en Esperanto-literaturo (almenaŭ laŭ mia scio). Do mi demandis fine de la vojaĝo Gerriton, ĉu li pretus verki historion




de Kristanismo, samkoncize, kiel li respondadis la demandojn de Mikaelo, ĉar ĝin mi volonte eldonus. Li konsentis kun nura kondiĉo, ke mi ne rajtas urĝigi lin; pro aliaj taskoj li bezonos eble du jarojn por plenumi

mian peton.

Kaj ni ambaŭ plenumis niajn promesojn. Li verkis la libreton kaj mi ĝin eldonis. Ne temas pri lernolibro, tamen oni renkontas preskaŭ ĉiujn gravajn etapojn de la evoluo de Kristanismo, foje kun tre personaj akcentoj. La formo, ofte mallongaj ĉapitroj, kompletigataj per instigoj al plulegado, estas sendube tre konvena por ricevi la bazajn informojn pri la temo, kiu estas certe interesa ankaŭ por nekredantoj; ja nia eŭropa civilizacio baziĝas sur la kristana fundamento. Nu, prijuĝu mem.

Petro Chrdle

TRIESTO, INTER KARSTO KAJ MARO MAGIAJ ITINEROJ



Ekzistas multaj kaj ĉiuspecaj gvidlibroj, turismaj publikaĵoj, pli aŭ malpli ampleksaj kaj enhavoriĉaj, ĝenerale pri la tuta urbo kaj ties ĉirkaŭaĵoj aŭ, pli specife, pri urbaj aŭ eksterurbaj allogaĵoj. En ĉiu el ili vi povas malkovri ion ne diritan en la gvidilo de vi ĵus aĉetita, ĉar skribi pri propra urbo ne facilas: foje amo pri ĝi povas vuali eĉ la veron!

Ĉi tiu prezentaĵo ne havas la pretendon esti impona verko, ĝisfunde detala: per ĝi nia intenco estas nur akompani vin tra Triesto por simpla promenado, klopodi transdoni tiujn sentojn kiuj estas kaŝitaj en la koro de ĉiu triestano, montri la plej belajn aspektojn, kun espero ke tio instigu vin al posta pliprofundigo en la kulturon kaj en la kutimojn de ĉi urbo, kiu fieras pri siaj pluretneco kaj plurlingveco kaj atendas vin je malfermitaj brakoj. Malkovru Trieston, eĉ vagante tra ĝi sencele: certe vi sukcesos porti hejmen ion neforgeseblan!

Triesta Esperanto-Asocio

KOMENIUS - ZAMENHOF

La Vojo al Harmonio

Jaroslav Karhan (daŭrigo)

En la Zamenhofaj manuskriptoj – trovitaj kaj publikigitaj post lia morto – estas i.a. eĉ jenaj vortoj: «Dum en la mondo scienca mi perdos ĉian estimon, mi samtempe en la mondo de kredantoj, trovos nenian kompensan simpation, verŝajne nur atakon, ĉar mia kredo estas tute alispeca ol ilia kredo... Estus pli prudente, se mi silentus, sed mi ne povas...»

Kaj fakte, kritiko de tiu ĉi lia religia koncepto aperis eldiversaj flankoj. Ekzemple pastro de unu granda religio – P. Dombrovski – proklamis, ke tiu ĉi koncepto estas kontraŭreligia. Zamenhof, en malfermita letero, publikigita en gazeto «Ruslanda Esperantisto», en 1906, respondis al li:

«Homaranoj ne havas intencon krei ian **novan** religion, ili volus nur krei **ponton**, kiu povus pace ligi inter si **ĉiujn religiojn** ekzistantajn...»

Se Kristo kaj la aliaj grandaj instruistoj de la homaro nun vivus kune, ili certe facile interkonsentus inter si, ili certe la «efektivajn postulojn de Dio» metus pli alten ol ĉiujn diferencajn formalizaĵojn, kaj ni havus nun ne multajn religiojn, sed unu ĉiuhoman religion.

Sed la fondintoj de la religioj ja nun ne vivas, restis nur la «religioj», kiuj portas iliajn nomojn... Tial ni devas strebi pri ilia alproksimiĝo, precipe per akcepto de universala religia kerno, kiun ĉiu homo povas kulturi kun pura Konscienco...

Homaranismo ne estas kontraŭreligia, male, ĝi volas forigi reciprokajn murojn inter religioj kaj redoni la religian

fundamenton al tiuj, kiuj – per forlaso de religiaj dogmoj – perdis eĉ la bazan kredon en Dion, kiu estas por ili tre ligita kun tiuj ĉi dogmoj...

Vin, sinjoro Dombrovski, kiu estas homo sincere kaj profunde religia, efektive kaj kore sindona pastro de Dio, mi demandas: Se vi povus vin turni al tiu granda morala Forto, kiun vi nomas «Dio» kaj demandi Lin, ĉu Li preferus, ke homoj havu multajn religiojn kaj tial malamadu sin reciproke kaj ĉiu diradu, ke nur **lia** religio estas la vera, aŭ ke la homoj aranĝu inter si ponton, per kiu ĉiuj religioj povos iom post iom kunfandiĝadi en unu religion, kaj ili konstruu templojn komunajn, en kiuj ili povos frate ellaboradi al si idealojn kaj morojn komunajn – kion Dio respondus?

Se vi estas certa, ke Li preferus la unuan, tiam batalu kontraŭ homaranismo; sed se vi pensas, ke Li elektus la duan, tiam... ne batalu por ni (ĉar mi komprenas, ke kiel pastro vi ne povas tion ĉi fari, almenaŭ nun), sed almenaŭ ne batalu kontraŭ ni, ĉar, batalante kontraŭ ni, vi batalos kontraŭ volo de Tiu, al kiu vi ĉiam sincere kaj honeste servis.»

La pluan kontraŭstaron, ke ideoj de homaranismo ne estas novaj, Zamenhof respondis: «Jes, ni scias, ke nia ideo ne estas nova; sed ĝuste tio ĉi estas ja nia forto; ĝuste tiu fakto, ke pri nia ideo ĉiam revis kaj revas la plej bonaj homoj en ĉiuj tempoj kaj en ĉiuj lokoj de la Tero, pruvas, ke tiu ĉi ideo estas ĝusta, ĝia realigo necesa... ke la celado al ĝi devus fariĝi afero de **ĉiu** homo.

Homaranismo celas ununuran: de vortoj kaj revoj transiri al agoj, ekmarŝi praktikan vojon al ilia tutmonda realigo...

(daŭrigota)

Tristaj informoj el Opava

La 10-an de marto 2014 mortis post plurjara malsano **Josef Solnický**, unu el movadaj apogintoj en Opava, en la aĝo de 84 jaroj. Profesie li estis fotografisto, kiu krom mallonga paŭzo dediĉis sian tutan profesian vivon al Silezia muzeo en Opava. Komence li tie asistis al sia bofrato, post ties morto li transprenis la funkcion de ĉefo de la muzea fotografia fako. Li dokumentis ne nur ampleksajn kolektojn de Silezia muzeo, sed senlace fotografis ĝeneralan vivon kaj evoluon en Silezio kaj norda Moravio. Liaj forografaĵoj akompanis multajn eldonaĵojn pri kaj el tiu regiono. Memstare li prezentiĝis per fotolibroj **Opava, Jese-níky** kaj aliaj. Merite al li estis sub fotoj ofte uzita ankaŭ Esperanto, speciale en fremdlingvaj eldonaĵoj.

En la Esperanto-kurson li aliĝis en Opava kaj en la somera kursaro en Rožnov pod Radhoštěm. Li pliaktiviĝis, kiam la skolta movado estis en Ĉeĥoslovakio likvidita kaj grupo de skoltoj transiris al la loka Esperanto movado. Tiutempe jam organiziĝis pro samaj kialoj flanke de E. asocio junaj esperantistoj en Ĉeĥoslovakio kaj Opava Junularo fariĝis neoficiala frunto de la movado. En la jaro 1952 efektiviĝis en Žimrovice ĉe la rivero Moravice Somera Esperanto-tendaro, kiu kelkfoje en sek-vaj jaroj ripetiĝis. Ili fariĝis renkontejo kaj klerigejo de novaj Esperanto-funkciuloj. La ĉefa organizanto de tiuj SET-oj estis Josef Solnický. Dum jaroj, eĉ post transiro de la tendaroj aliloken, li restis grava persono de la movado en Opava. Malgraŭe li neniam sopiris pri gravaj funkcioj en regiona aŭ tutŝtata niveloj. Krom du-tri okazoj li eĉ neniam parto-

prenis internaciajn renkontiĝojn eksterlande. Pro lia publika prestiĝo en Opava kaj vasta ĉirkaŭaĵo li ofte tre grave helpis realigi planojn de Esperanto klubo en Opava, kelkfoje tre ambiciajn – kulturaj festivaloj, internaciaj kongresoj ktp. En la lastaj jaroj li pro grava malsano jam ne povis aktive labori, tamen lia foriro estas por opavanoj grava perdo kaj signalas malprogresigon de Esperanto en tiu urbo.

La 28-an de aprilo 2014 mortis en Opava en la aĝo de 84 jaroj **Jaromír Polčík**. Kvankam li laŭ ĝenerala difino esperantisto ne estis, tamen li enskribiĝis en la historion de E-movado. En la jaro 1968, kiam mi inspiris aktoran grupon de membroj de Opava teatro ekstudi kaj surscenigi en la internacia lingvo la konatan dramon de V. Nezval Manon Lescaut eminente tradukita de J. Kořínek, J. Polčík estis la ĉefrolinto kiel Des Grieux. Li same kiel ĉiuj aliaj membroj de la grupo en la rapidkurso de mi organizita ekregis Esperanton en tia grado, ke ili kapablis facile interparoli kaj ĉefe sur scenejo tutan vesperon plenumi siajn rolojn en ĝi. La projekton forte subtenis la urbo Opava kaj regiona komitato en Ostrava. La premiero okazis en Opava teatro, poste la ensemblo elvojaĝis en Jugoslavion kaj patroprenis kun granda sukceso en la urbo Pula la 1-an festivalon de Esperanto-teatroj. Septembre 1968 la prezentado ripetiĝis en Jablonec nad Nisou en la programo de Internacia Ekspozicio de Biĵuterio. Estis planitaj kaj antaŭkonsentitaj kelkaj prezentadoj en la internaciaj E-renkontiĝoj, sed konataj politikaj eventoj en la jaro 1968 ĉion malhelpis.

Nur eltiraĵon el la surscenigo oni envicigis en la televidan E-kurson en Bratislava, sed poste ĉio finiĝis. Kelkaj rolintoj forestis el Opava kaj oni jam neniam kapablis kunigi tiujn, kiuj brile kaj perfekte plenumis tiun kulturalan eventon. Jaromír Polčík kelkajn jarojn ludis en Opava teatro, poste grave malsaniĝis kaj pli ol dudek jarojn vivis solece fermita en hejmo.

V. Kočvara

Forpasis Zdeněk Hršel

Honora membro de ĈEA kaj honora prezidanto de Esperantista klubo en Brno Zdeněk Hršel forpasis la 3-an de junio 2014.



Li naskiĝis la 19-an de septembro 1928 en Hradec Králové kiel filo de muzikisto Karel Hršel. Dum la gimnaziaj studoj instruis

lin Miloš Lukáš, scianto de multaj lingvoj kaj eminenta tradukanto, kiu lernigis al li ankaŭ Esperanton. Sub lia influo li komencis labori en la movado, unue en Hradec Králové, poste en Brno. Li studis universitate filologion de nordiaj lingvoj kaj laboris multajn jarojn kiel ĉefo de teknika biblioteko.

Li redaktis kaj ciklostilis klubajn bultenojn (*Hradecano*, *Internacia Kata Gazeto*, *Bulteno de EK Brno*) kaj prilaboris broŝurojn pri esperantlingva literaturo en Moravia Landa Biblioteko. En la klubo de Brno li multajn jarojn aktivis kiel sekretario kaj poste prezidanto. En 1984 li iniciatis kaj gvidis

preparadon de nova esperanta-ĉeĥa kaj ĉeĥa-esperanta vortaro, kiun poste komputile finredaktis Karel Kraft kaj eldonis KAVA-PECH en du volumoj.

Li grave kontribuis ĉe redaktado de *Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio* (1983) de Stanislav Kamařýt kiel kunlaboranto de Jaroslav Mařík kaj helpanto de la ĉefa redaktoro Jan Werner.

Ankaŭ la eldono de *Propra biografio de Karolo la IV-a* (1995) en traduko de Josef Vondroušek tre ŝuldas al Zdeněk Hršel: ĉiuj glosoj kaj komentoj pri historiaj eventoj aŭ citaĵoj el Biblio estas lia merito.

Li esperantigis prospekton *Urbo Brno – ĝusta direkto*, oficialan retejon de la urbo Moravské Budějovice kaj ĉirkaŭaĵo, bonhumoran rakonton de Jaroslav Hašek *La Amsterdama hom-negocisto* kaj verkis artikolon por AEST *Apliko de Esperanto en la laboro de informcentroj*.

Por Rudná, kie troviĝas lia somerdomo, li ĉeĥlingve prilaboris historion de la civito.

De Otto Sklenčka li ricevis albumon de ĉeĥoslovakaj UEA-delegitoj en la jaro 1927 (fotoj kun nomo kaj domicilio), nun la kolekto troviĝas en Esperanto-muzeo Svitavy.

Sed plej multe da energio li dediĉis al *Bibliografio de la verkaro de Miloš Lukáš*, kies disĉiplo kaj ŝuldanto li sentis sin. Li kolektadis ĉiujn liajn verkojn kaj tradukojn, ankaŭ leterojn kaj artikolojn aŭ iun ajn mencion pri la amata instruisto kaj majstra tradukanto. Persiste li serĉis, preskaŭ ĉasis, informojn pri originaloj, el kiuj M. Lukáš tradukis, en landa kaj urba bibliotekoj, ĝis la fatala falo, kiu lin kondukis al operacio en hospitalo.

-mm-

BIBLIOTEKA APOGO BACHRICH

Danke al malavara donaco de la gefiloj de Johano kaj Maria Bachrich, UEA povis denove starigi fondaĵon por subteni la pliriĉigon de la kolektoj de Esperanto-bibliotekoj. Ekde 1997 funkciis Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen, kies kapitalo elĉerpiĝis en 2011. Lastatempe la gefiloj de ges-roj Bachrich donacis al UEA 20 000 USD (ĉ. 14 500 EUR) kiel kapitalon de la Biblioteka Apogo Honore al la Geedzoj Maria kaj Johano Bachrich. La Estraro de UEA akceptis kun granda dankemo la donacon, kiu laŭ la interkonsento kun la gefiloj Bachrich ebligis subvenciojn dum dek jaroj.

Johano (Juan) Bachrich estis eminenta venezuela esperantisto, kiu naskiĝis en 1921 en Vieno kaj lernis Esperanton en 1938 en Zemun (Jugoslavio). Ekde 1948 li vivis en Venezuelo. Li estis longe la motoro de Venezuela Esperanto-Asocio, kiun li reprezentis en la Komitato de UEA ekde 1978 ĝis sia forpaso en 2005. Li estis ankaŭ mecenato de la Movado, kontribuante i.a. al la realigo de la instruaj videoprojektoj **Mazi en Gondolando** kaj **Esperanto: Pasporto al la tuta mondo**. En 2000 li fariĝis Honora Membro de UEA. Lia edzino Maria, ankaŭ esperantisto, naskiĝis en 1936 kaj forpasis en 2011.

Biblioteka Apogo Bachrich disdonos subvenciojn unufoje ĉi-jare. Ili estas celitaj al Esperanto-bibliotekoj, kiuj ne estas financataj de ŝtata, urba aŭ alia nemovada instanco. Diference de la iama Apogo Thorsen, kiu subvenciis nur akiron de libroj, la subvencioj estas uzeblaj ankaŭ por aliaj varoj aĉeteblaj ĉe la Libroservo de UEA.

Por peti subvencion, oni sendu priskribon pri la biblioteko kaj liston de dezirataj libroj aŭ aliaj varoj, ordigitaj laŭ prefero. La petoj atingu la Centran Oficejon de UEA ĝis la 30-a de aŭgusto papere (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando) aŭ retpoŝte.

Gazetaraj Komunikoj de UEA n-ro 544

La vortfarado en Esperanto



Societo por Internacia Lingvo Esperanto en Brno (SILE) eldonis ĉeĥlingve 165-paĝan libron de Jan Werner pri la vortfarado en Esperanto. La aŭtoro detale priskribas teoriojn de René de Saussure, Kalmán Kalocsay kaj Gaston Waringhien kaj polemike ilin defendas kontraŭ teorioj de Emanuel Halvelik, Olav Reiersøl, István Szerdahelyi, Ilona Koutny, Bertil Wennergren kaj Wim Jansen. Tiamaniere la leganto konatiĝas kun diversaj opinioj pri vortfarado, kiuj ekzistas en la nuntempa movado.


La libro estas destinita por tiuj, kiuj ne volas kontentiĝi nur per minimumaj scioj de Esperanto, sed celas enprofundiĝi en la lingvon, por povi aktive labori en la movado sur la literatura kampo.

Ĉar la libro estas verkita ĉeĥlingve, ĝi povas vekti intereson ankaŭ ĉe la ĉeĥaj lingvistoj kiel vere serioza (ne propagandista) priskribo de la internacia lingvo.

La libro (105 Kč) estas mendebla ĉe: Bohumila Trzosova (SILE), Vranovská 16, 614 00 Brno; bohula@centrum.cz.

Eduard Kühnl – 130

Eduard Kühnl (1884-1966) apartenas al pioniroj de nia movado kiel fondinto de *Bohema Unio Esperantista* (1908) kaj de ĝia



organo *Časopis českých esperantistů – Bohema Revuo Esperantista*, en kiu regule aperadis la plej amata ĉeĥlingva libro *Avineto* de Božena Němcová en traduko de Vladimír Tobek kaj Karel Procházka. Li mem verkis lernolibron de Esperanto (t.n. Kühnl-metodo) kaj tradukis (kune kun K. Procházka) satiron de Hugo Vavris *Sherlock Holmes en servo de la hispana trono*, nun konata kiel filma komedio kun Vlasta Burian en rolo de Lelíček. Hugo Vavris, propranome Hugo Vavrečka (1880-1952), ĵurnalisto kaj diplomato, estis avo de Václav Havel. Ankaŭ Kühnl post la unua mondmilito fariĝis ĉeĥoslovaka diplomato en Kubo kaj Peruo kaj mortis en Nov-Jorko.

Kiam li veturis al la pariza kongreso en 1914, li estis arestita de francoj kiel ŝtatano de malamika ŝtato kaj ekspedita al Hispanio, kie li vivis inter esperantistoj ĝis ekesto de Ĉeĥoslovakio, al kiu li komencis servi diplomate.

La movadon li eniris kun sia frato František, ambaŭ kunlaboris kun Čejka, Kamarýt, Hromada, Bouška kaj kontribuis al ilia revuo *Bohema Esperantisto*. Sed poste tiuj 25-jaruloj ekkverelis kaj Kühnl fondis propran asocion kun propra revuo. Ambaŭ grupoj kondutis malpace, nur post la milito ili kuniĝis, sed tiam Kühnl jam forlasis la movadon. Nelonge antaŭ la dua mondmilito li donacis sian bibliotekon al Nacia Teknika Muzeo en Prago intencante krei tie Esperanto-fakon. La muzeo transdonis librojn al Esperanto-klubo en Prago (nun ili troviĝas en la urba muzeo en Česká Třebová en ties Esperanto-kolekto), aliaj materialoj estis en la teknika muzeo trovitaj antaŭ nelonge kaj atendas profesion prilaboron.

Lia 15-jara esperantista aktivado postlasis plurajn librojn kaj gazeton, plenan de literaturaĵoj kaj informoj pri la komencoj de nia movado.

-mm-

Ni rememoras

Juan Régulo Pérez (1914-1993), profesoro de la universitato La Laguna en la Kanariaj Insuloj, kiel eldonisto apartenas al plej grandaj personoj de nia tutmonda movado. En lia eldonejo Stafeto aperis pli ol 70 verkoj de tiaj aŭtoroj kiel Auld, Boulton, Baghy, Rossetti, Waringhien k.a. Kuraĝe li tie eldonis ankaŭ satiran poemon de Karel Havlíček Borovský *Bapto de caro Vladimír* en traduko de Tomáš Pumpr, kvankam kelkaj frankistoj postulis likvidon de la tutan eldono kaj malpemeson vendi la verkon en Hispanio. Alia ĉeĥa verko de li eldonita estis *Romeo, Julieta kaj tenebro* de Jan Otčenášek en traduko de Vladimír Váňa (kun speciala antaŭparolo de Louis Aragon).



En majo ni rememoras 120 jarojn de „nia panjo“ **Anna Bárachová**, fraŭline Anči Nývltová (1894-1975), honora membrino de ĈEA, komitatanino de esperantista klubo en Prago. Ekde 1922 kasistino, librotenistino, kurs-gvidantino, zorgantino pri blindaj esperantistoj, dissendantino de la kluba bulteno (1953-1958) kun 1800 abonantoj.

La 19-an de aŭgusto pasos 110 jaroj de **František Omelka** (1904-1960), instruisto kaj verkisto por infanoj, eminenta esperantisto. Kvar siajn ĉeĥlingvajn verkojn li mem esperantigis (*Aventuroj de Antonio, La Alaska Stafeto, Kaptitoj de la Glacirokoj, La Granda Admiralo*). La lasta romano pri Magalhaes kaj lia unua vojaĝo ĉirkaŭ la mondo aperis prese nur en la ĉeĥa versio. Lia plej fama verko tradukita en aliajn lingvojn estas *La Alaska Stafeto* pri kvar heoraj sledistoj kun hunda jungitaro, kiuj en la jaro 1925 alportis tra glacia pejzaĝo serumon por la alaska urbo Nome, en kiu mortadis infanoj pro epidemio. Ĉeĥlingve li verkis ankaŭ pri batalo kontraŭ faŝistoj, pri knaboj kaj iliaj intervilaĝaj militoj, historian rakonton pri heroa knaba husano, pri konkurso de unuaj aviadistoj k.s. Multajn artikolojn li tradukis el Esperanto en la ĉeĥan. Liaj verkoj estas troveblaj en la interreto.



AMO EVOLUIS

Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) okazis en marto 2014 en Hungario.

Kiel pretigi gazetarajn komunikojn – jen la temo de Lu Wunsch-Rolshoven, kiu pretendis, ke bone preparita gazetara komunikado povas esti bazo por la tre kostefika maniero diskonigi Esperanton per amaskomunikiloj. La pretigo povas okupi unu ĝis du horojn (post spertiĝo!), disiras eble al trideko da ĵurnalistoj, kaj se unu aperigas ĝin en loka gazeto, ĝi povas atingi dekojn da miloj da legantoj. Li prezentis diversajn konsilojn pri la stilo, longeco kaj enhavo de bonaj komunikoj. Kiel ĉiam, la sesio enhavis praktikan ekzercon por la seminarianoj: ili ene de dek minutoj devis pretigi nacilingve komencon de komunikado pri la nuna aranĝo, aŭ pri alia renkontiĝo aŭ evento.

Kiel eluzi modernajn komunikajn teknikojn – jen la temo de Petro Baláž. Pli frue Orlando Raola pensigis nin pri la komunika enhavo – kion ni komuniku por kapti la atenton de diversaj kategorioj de homoj. Petro pensigis nin pri la uzeblaj rimedoj – kiel ni komuniku por atentokapti. Li dismetis diversajn kriteriojn por la uzado de precipe retaj komunikiloj – emfazante la rapidecon kaj neantaŭvideblecon de ŝanĝoj ĉe novaj teknologioj, kun la sekvo, ke ni ĉiun kelkan jaron devas reipensi niajn strategiojn kaj prioritatojn. La diskutoj tuŝis la temon de la teknologia golfo inter majstrantoj kaj uzantoj de modernaj komunikiloj, kaj tiuj kiuj ne kapablas, aŭ konscie decidas, ne uzi ilin. Ni devas konscii, ke tiu golfo ekzistas ankaŭ inter esperantistoj, kaj ne temas sole pri generacia divido.

Stefan McGill

foto Petro Baláž



KALENDARO 2014

2014-07-12/20 Somera Esperanto-Studado en Nitra
Info: ses@ikso.net

2014-07-13/26 Dua etapo de SET Lančov

2014-07-27/08-08 Tria etapo de SET Lančov

2014-08-08/10 Renkonto de ekstendaranoj en SET Lančov
Info: let.lancov@seznam.cz

2014-08-09 La 2-a E-mentala pikniko en Saksa Svislando
<http://www.e-mental.cz/archiv/5927>

2014-09-06 La 3-a E-mentala pikniko en Saksa Svislando
<http://www.e-mental.cz/archiv/5930>

2014-09-08/14 Aŭtuna lingva sminario Skokovy
Info: drahotova@esperanto.cz

2014-09-12/14 Renkontiĝo de ĉeĥa IKUE-sekcio en Svatý Kopeček ĉe Olomouc,

Info: m.svacek@seznam.cz

2014-09-20 Postferia Renkontiĝo en Strž apud Dobříš

Info: pisek@esperanto.cz

2014-09-27/28 Inaŭguro de la ekspozicio "Esperanto kaj kolektado", Tutŝtata filatela ekspozicio + Kleriga dimanĉo en Svitavy,

Info: svitavy@esperanto.cz

2014-10-24/26 ĈEA-Kongreso en Prostějov

Info: cea@esperanto.cz

2014-10-30/11-02 3-a Internacia Esperanto-Lernejo en Bartošovice

Info: verdastacio@gmail.com

2014-11-07/08 Brila Internacia Esperanto-Renkontiĝo en Poděbrady

<http://www.e-mental.cz/archiv/5900>

2014-11-13/16 Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST),

info: <http://kaest.ikso.net/>

2014-11-29 AnkRo Info: pisek@esperanto.cz

2014-12-13 Marcipana Kristnasko en Svitavy

Info: svitavy@esperanto.cz

Jubileoj

Ni rememoras vivjubileojn de pluraj gravaj esperantistoj. S-ino **Jiřina Vondráková** dum multaj jaroj laboris en la centraj organoj de ĈEA. S-ino **Květa Černá** estas motoro de la klubo en Přerov kiel bibliotekistino kaj organizantino de diversaj aranĝoj. S-inon **Věra Podhradská** ĉiuj konas kiel eksan prezidantino kaj multjaran komitatantino de la asocio, estraranino en Brno kaj mastrumantino en

Somera Esperanto-Tendaro en Lančov. Kun Lančov estis ligita ankaŭ laboro de **František Sklenář** el Třebíč. **Václav Kaprál** aktivis en la klubo de Plzeň. **Stanislav Papírník** en la 1980-aj jaroj gvidis la klubon en České Budějovice kaj eldonadis revuon *La Progreso*. **Jan Fidel Řepa** el Netolice, eksa asocia komitatano, populara pro sia humuro, kiel amatora aktoro ludas rolon de Karel Čapek en la teatraĵo *RUR aŭ Terura sonĝo* kaj legas esperantlingvajn komentojn al video-filmoj. **Petr Tomašovský** estas nia plej diligenta kontribuanto al esperantlingva Vikipedio kaj esperantiginto de pluraj verkoj el la ĉeĥa.

Geraldo Mattos

(1931-2014)

Brazila filologo kaj Esperanto-poeto, iama prezidanto de Akademio de Esperanto (1998-2007) forpasis la 23-an de marto 2014. Geraldo Mattos naskiĝis la 28-an de junio 1931, diplomiĝis pri latino kaj latinidaj lingvoj kaj doktoriĝis pri filologio. Esperanton li lernis en 1947. Li famiĝis per prozo (*La nigra Spartako*, pri ribelo de nigrulaj sklavoj), poezio (*Barbaraj sonoj kaj sonetoj*, *Arĉo*, *Miniaturoj*, *Rimoj de Vivo*), teatraĵo (*Ivan la sesa*) kaj eseoj (*La deveno de Esperanto*, *Apartaj mondoj: verboj kaj participoj* k.a.). Akademiano li estis ekde 1970.

Ni kondolencas

- **Anna Picková** (98-jara) el Hlinsko mortis la 14-an de decembro 2013

- **Drahomíra Budířská** (73-jara) la 28-an de marto 2014 estis murdita en sia kabano proksime de Krnov

Nova komisiito pri Pasporta Servo: Roy McCoy!

Dum sia aprila, italia kunsido, la estraro de TEJO nomumis Roy McCoy kiel komisiiton de TEJO pri Pasporta Servo. Li estis multjara redaktoro de Jarlibro de UEA, nun emerita.

Ĉantorio

La 15-an de junio 2014 okazis jam 80-a internacia renkontiĝo de ĉeĥaj, polaj kaj slovakaj esperantistoj sur landlima monto Ĉantorio - en Silezio. Kunvenis pli ol 40 gesamideanoj kaj familianoj. Kvankam sur monto regis nebulo kaj pluveto, ni sidis en turista kabano - amuzis, rakontis kaj kantis. Ankaŭ alveturis nia amiko P. Polnický el Poděbrady.

Lad. Němec



(www.esperantovtkovice.estranky.cz)

TRADICIA RENKONTIĜO DE KATOLIKA SEKCIO DE ĈEA

okazos de la 12-a ĝis la 14-a de septembro 2014 en Svatý Kopeček (Sankta Monteto) apud Olomouc.

La aranĝo okazos en belega pilgrim-arealo en spiritekzerca centro Norbertinum.



bildo el Vikipedio

SUPOZATA PROGRAMO:

konferenco de la sekcio, sanktaj mesoj, prelego de d-ro Max Kašparů, projekciado el IKUE-aranĝoj, ekskurso (laŭ-elekte al la urbo Olomouc aŭ al la bestoĝardeno en Svatý Kopeček).

Loĝado en 1-2 litaj ĉambroj (kun propra aŭ komuna duŝejo/necesejo).

Orientiga prezo de tranokto ĉ. 280,-350,- CZK/persono/nokte (laŭ kategorio de la ĉambro), 180,- CZK en propra dormosako. Aliĝkotizo 50,- CZK, matenmanĝo 35,- CZK, tagmanĝo 75,- CZK, vespermanĝo 60,- CZK.

Elkore invitataj estas ankaŭ nemembroj de la sekcio! Pli detalaj informoj kaj aliĝilo troviĝas en

<http://www.ikue.org/cz/svatykopecek/svatykopecek.htm>

Limdato por aliĝoj estas la 30-a de aŭgusto.

KONTAKTADRESO: Miloslav Šváček, Tršická 6, CZ-751 27 Penčice

(tel. +420 732 420 675),

m.svacek@seznam.cz

**Periodikum Českého
esperantského svazu - 45. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

starto@esperanto.cz

http://www.esperanto.cz/starto

**Předplatné v Česku (bez členství ve
svazu): 200 Kč**

Členská evidence a změny adres:

**p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,
683 04 Drnovice,**

**vratislav.hirs@esperanto.cz,
tel. 517 444 117**

Uzávěrka příštího čísla: 15.8.2014

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio -
- 45-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj
aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 11 eŭroj, ekster Eŭropo
13 eŭroj**

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

Redaktoro: Miroslav Malovec,

Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

Ĉeĥio, starto@esperanto.cz

http://www.esperanto.cz/starto

Presis: DTP centrum, Svitavy

**Redakto-fermo de la sekva numero:
15.8.2014**

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

Jazykový koutek

Víte, jaký je rozdíl mezi podobnými slovy?
Podívejte se na stránku, kterou připravil
Miroslav Hruška:

<http://www.esperanto.cz/cs/aktuality/jazykova-rubrika-c-2-slova-podobna-s-odlisnymi-vyznamy.html>

Homekologio

Kiu interesiĝas pri kreado de baza unueco en
multekultura Eŭropo, vizitu retejon pri tiu temo:
<https://sites.google.com/site/roansartstinkery/home/esperanto/homekologio>

LA MIGRA EKSPOZICIO PLU SURVOJAS

La ekspozicio "*Ĉu Esperanto estas morta lingvo?*", kiu estiĝis en marto 2010 en Písek, estis ĝis nun publike prezentita en 27 institucioj en 24 urboj en 10 regionoj de la tuta Ĉeĥio.

Tiel ĝi fariĝas supozeble la plej granda tiuspeca ekspozicia projekto en Esperantujo entute. Ĝia fino estas planata por novembro 2015.

Ankoraŭ restas 4 liberaj monatoj por la sekva jaro kaj pro teknikaj kialoj liberiĝis ankaŭ septembro 2014. Se via klubo havas intereson organizi la ekspozicion en via urba biblioteko, muzeo aŭ simila institucio, bv. skribi por pli detalaj informoj al

pavla.dvorakova@esperanto.cz.

Elkoran dankon al Esperanto-klubo en Plzeň, al d-ro Miroslav Vančo kaj al Jana Křížková el Esperanto-klubo Česká Třebová por aktiva surloka helpo koncerne realigon de la ekspozicio printempe 2014 en Plzeň (marto), Spálené Poříčí (aprilo) kaj Lanškroun (majo).

Post feria paŭzo la ekspozicio plu migros al Moravio, nome al urbaj bibliotekoj en Přerov (oktobro) kaj Uherský Brod (novembro). Pli detalaj informoj aperos en Starto 2014/3.

-padv-

Rimarko: pri la ekspozicio en Plzeň kaj Lanškroun legu la paĝon 36.



Esperantistoj en la uzino CIMBRIA HMD



Ekskurso al Bludov



Sabla Printempo en Skokovy



Zdenka Novotná kun sia hundino Katido reprezentas Esperanton dum Festo de Patrinoj



Ovofritaĵo en Vítkovice



Ĉantorio